

N-ro 5/2014
26a jaro (2a periodo)

# inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Hilde L. Bye – Muntis: jpa

## Mojosa vespero

Ni esperantistoj loĝas en diversaj anguloj en nia longa lando kaj ne ĉiam havas tempon vojaĝi longe por renkonti aliajn esperantistojn. Tial ni kunvenas rete. Preparu tason kun teo kaj malstreĉiĝu – esperantobabilado venos hejmen al vi! Ni kunvenas per skajpo kaj babilas pri io ajn, ekzemple renkontiĝoj, vojaĝoj aŭ simple la vetero. Pasintfoje kunvenis esperantistoj el la norda kaj suda partoj de du landoj: de Norvegio kaj Finnlando.

Nia venonta mojosa vespero okazos merkrede, la 29an de oktobro je la 20a horo skajpe. Se vi estos en Oslo dum tiu vespero, vi povos renkonti esperantistojn hejme ĉe Leif Arne Storset en Dynekilgata 19a (proksime de Carl Berner) je la 19.30 horo. Bv. sendi mesaĝon al li antaŭe, limtempo estas 3 horojn antaŭ komenco, t.e. je 16.30. Por partopreni skajpe, vi simple bezonas komunikilon *Skype* kaj aldoni nin (ekzemple min: *elchretterin*) al via kontaktlisto. Ĝis venonta mojosa vespero!

*Amelie Matt*




© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com







## Ni vidos

Verkis Johanna Andersson (origine: «Vi får se»).

Tradukis el la sveda: Hilde L. Bye
Grafike aranĝis: J. P. Abrahamsen


Tamen efektive egalas kion mi faras.
Mi ĉiuokaze pensas pri vi.
Imageble ne
gaje ol ĉi ti
sufiĉe da b
sufiĉe da
Solv-iĝos
Ne, tamen ne
Kvankam vi ne donas vivsignon...
La somera nokto prenas min hejmen.


SED VI NE VOKAS. DO, MI IRAS AL DRINKEJO. DRINKAS UNU BIERON, DRINKOS DU. EBRIIĜOS.
SVANTES KÄLLARE
UPLANDS NATION
UP
30
IĜOS PLI
EL. JAM
IERO,
HOMOJ
SED MI NE HAVIS SUFIĈE DA VI. VI ESTAS LA ESCEPTO.
KAJ KIAM MI VEKIĜOS
EBLE MI ESTOS
FIN-
ATENDINTA